NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
☎ lunde vaspere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
NOVEMBRO 1995

**VIZITAS MEL**
Venis al Madrido por studi hispanan lingvon Banildo, esperantisto el Brasilio. Li kutime vizitas kaj aktive partoprenas nian konversacian rondon

**HISPANIO**
P-ro Selten (Nobel Premio pri ekonomio 1995) estas elstara sciencisto monde konata. Normale, li neniam estus venonta al **Murcio** ĉar li malakceptas invitojn de universitatoj multe pli gravaj ol ĝi. Li venas ĉi tien ĉar li estas esperantisto kaj membro de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino kaj dank'al klopodoj de D-ro Pérez Óvilo (kiu parolis kun murciaj aŭtoritatoj por atingi inviton, kaj subvenciojn por la vogajo de la P-ro kaj sia edzino).

Eldonita de **Fundación Esperanto** ĵus aperis la libron de Antonio Marco Botella "Lirikaj perloj de Al-Andalus". (327 pĝ. 1.900 PTA). Premiera antologio en esperanto pri hispana-araba-hebrea liriko.

En altnivela kurso de angla lingvo, okazinta en la Supera Konsilantaro de Scienca Esploro (CSIC), Juan Carlos Ruiz estis invitita de la profesoro paroli pri avantaĵoj kaj malavantaĵoj de esperanto kiel internacia lingvo, kaj ĝin kompari kun la internacia rolo de la angla. Post la parolo de nia samideano, la angla profesoro deklaris sian intereson pri la movado.

**GLUAĴOJ**
Demetrio Esteve denove donacis al la Liceo pakaĵoj de gluaĵoj kun la teksto "Mi ♥ esperanto-n" kaj la telefon-numero de la Federacio.[1] DANKEGON ¡¡¡




***HEF ANGULO** (Ne oficiale)*
MEL petis al HEF studi eblecon por reeldoni (kune kun aliaj grupoj) "Lexicón Sopena"-n ĉar laŭ lastaj informoj la eldonejo SOPENA ne havas planon por fari ĝin. Je la nomo de HEF oni petis al SOPENA buĝeton por eldoni 1000 ekzemplerojn.

Finfine aperis en "Boletín" la kontoj-**1994** de HEF, ili estis pretaj ekde januaro 1995 laŭ la informatika sistemo instalita de Pedro Garrote en HEF-komputilo. Ĉu la buĝeto por 1996 estos presentita en la venonta Generala Asembleo?.

**ARĜENTA INSIGNO KUN VERDA STELO**
Farita de juvelisto simpatianto de Esperanto, MEL oferas po 300 PTA esperantan insignon faritan el arĝento kun emajloj blanka kaj verda. Sendoj po dek (10) antaŭpago de 2.700 PTA pere de poŝtmandato al Madrida Esperanto-Liceo (inkludas sendokoston).

**UK EN FINLANDO**
En la lasta numero ni forgesis la nomoj de Pepita Cabello kiu kune kun Francisca Yruegas kaj Mary Lis ĉeestis la Universalan Kongreson de Tempereo.

**JAM ESTAS PRETA LA KRISTNASKA LOTERIO, KIEL KUTIME NI KALKULAS JE VI.**

LOTERIO¡¡¡ **N-ro 45.678** PO 200 PTA.

**LOTERIA DE NAVIDAD. En envían pedidos previamente abonados. Hasta 2000 PTA se acepta el pago en sellos de correos de 19 PTA. Estamos en Atocha 98-4° los lunes de 19.00 a 21.00.☎ (91) 530 87 98**

---

[1].- Ĉar la Liceo ne havas automatan respondilon, por centrigi madridan e-informadon,kaj pro tio ke ĉe HEF bone funkcias administrajn agadojn, foje la Liceo uzas la telefon-numeron de HEF por profiti eblajn alvokojn.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

Ĉe la kafejo Villa de Madrid, en Plazo de Colón (sub la ĝardeno), okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredojn de ĉiu monato. Je la 19.00 horo. Kutime gvidas ĝin Ana Manero.

Ekde oktobro Carmen Suárez, kune kun Antonio Tur, instruas bazan kurson de Esperanto en Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00 (Meze de oktobro jam ne ekzistis liberan lokon). Antonio Tur daŭrigas la instruadon ĉe "Hogar del Pensionista Puente de Toledo"

**Venontaj prelegoj** ĉe la Liceo, je la 19.00 horo.

13a de novembro. "Malto, mediteranea insulo". Carmen Suárez.

4a de decembro. "Tropikaj fruktoj de Brazilo". Banildo.

16a de decembro (sabato) ZAMENHOFA BANKEDO.
Hotel Puerta de Toledo. 14.00 horo
Antaŭpago necese ĉe Liceo. 2.500 PTA

En oktobro okazis ekster-programa video-prelego de Juan Carlos Ruiz laŭ la temo "Promenado tra Vieno". Nia samideano profitis profesian vojaĝon por viziti la Internacioan Muzeon de Esperanto kaj paroli kun la deĵorantoj.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

- ★ 3a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno. 4a-11a de novembro. Salou (Tarragona)
- ★ **54a Hispana Kongreso de Esperanto. Salou (Tarragona). 9-12 novembro**
- ★ 4a Afrika Kongreso de Esperanto. 28 decembro-2 januaro. Kilimanĝaro (Tanzanio)

## Ĉu PTJ, ESP aŭ PTA?. (Klarigas Lupe Sanz)

La internacia simbolo de la hispana monero estas PTA (sen punkto, laŭ ISO standaro), la simbolo ne devas esti uzata kiel mallongigo kiam la nomo de la monero estas parto de frazo, "Luis havas multaj PTA por disdoni", ne estas korekta. La simbolo estas uzata nur post ciferoj, "Luis havas 100 PTA"; sed ne estas korekta "cent PTA", oni devas diri "cent ptjn.". Oni neniam devas anstataŭi simbolojn per mallongigoj ĉar la simbolo estas internacia kaj la mallongigoj estas malsimilaj por ĉiuj lingvoj

Mi vidis skribita "ESP" en internacia turisma gvidlibro de hoteloj kaj en "Boletín" n-ro 320, sed mi ne scias kion signifas tio. *Ĉu iu povas klarigi ĝin?.*

Mallongigo de pesetoj:

en la hispana lingvo, laŭ Reĝa Akademio estas ptas. aŭ pts. (por "pesetas", Luis tiene muchas ptas.). Hispane oni skribos: 100 pesetas aŭ 100 PTA sed neniam 100 ptas.

en esperanto estas ptj. (Luis havas multajn ptjn.).

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal